# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 16. Marto 13 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**


## UEA decidis: pri UK 2024: tio okazos en Tanzanio

Por la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), kiu okazos en 2024, la Estraro de UEA unuanime elektis Tanzanion kiel kongreslandon. La unuan fojon UK okazos en la kontinento Afriko. La gastiga urbo, Arušo, estas internacia turisma vojaĝcelo, sed ne nur: ĝi ankaŭ estas grava diplomatia urbo, la sidejo de la Orient-Afrika Komunumo kaj de la Afrika Kortumo de Afrika Unio. La regiono de Arušo loĝigas pli ol 2 milionojn da homoj. Ĝi troviĝas je la orienta branĉo de la Granda Rift-Valo, sub modera klimato. La grandurbo estas proksima al la Nacia Parko Serengeti, la Konservada Areo Ngorongoro, la Nacia Parko Lago Manyara, la Gorĝo Olduvai, la Nacia Parko Tarangire, la Monto Kilimanĝaro kaj la Monto Meru en la Nacia Parko Arušo mem.

La Esperanto-Asocio de Tanzanio (EATA) invitis kongresi en Arušo post multjara laboro de la Afrika Komisiono de UEA, kiu plenumis la taskon kunordigi la landajn asociojn en la kontinento por difini la invitanton de la unua UK en Afriko. La kunlaboro estis multhoma kaj internacia. Per tiu decido ankaŭ la Estraro de UEA plenumas devon de la Asocio, kiu en la pasinta jardeko deklaris la okazigon de UK en Afriko kiel strategian elementon por UEA.

La Asocio nun kunlaboros kun la lokaj aktivuloj por fiksi la datojn, lokan kongresan komitaton, temon kaj aliajn detalojn de la 109-a UK. La kongresejo estos la Aruŝa Internacia Kunveneja Centro, altnivela loko por internaciaj eventoj, kiu jam gastigis eventojn de UN. La Kongresa Fako kaj la Estraro de UEA ankaŭ kunlaboros kun ĉiuj partioj koncernataj de la okazigo de la UK, ĉu de la Esperanto-movado, ĉu de lokaj instancoj en Tanzanio. Jam eblas subteni la 109-an UK-on per donaco al la Fondaĵo Afriko de UEA: uea.org/alighoj/donacoj/afriko.

Indas ankaŭ aliĝi al la 108-a UK okazonta en 2023 en Torino, kiu devos kalkuli je speciala partopreno de tanzanianoj: uk.esperanto.net/2023. La nuna favorpreza aliĝperiodo finiĝos en la 31-a de marto 2023.

# Turismaj trezoroj de Tanzanio


**Bildoj de SMG kaj aliaj**








**Bonvenon al Aruŝa en 2024!**

















# Temoj por Torino

Dum nia preparkunsido ni interkonsentis, ke dum la kongresa semajno okazu ĉirkau 3 grandaj prelegoj, krome ĉirkau 3 pliaj kunvenoj kun po 2 au 3 pli mallongaj prelegoj, po 20 minutojn longaj (kun pliaj 10 minutoj da tempo por demandoj

**1** Prelego de Gianfranco Cattai, reprezentanto de federacio de NRO-j en Italio por migrantoj. S-ro Cattai prezentos la aktualan situacion rilate migradon en Italio kaj traktos la demandon kiel la registaro kaj la lokaj autoritatoj traktas la problemojn, kiun rolon ludas privataj iniciatoj au neregistaraj organizoj.
Gianfranco Cattai prelegos en la itala lingvo kun trtaduko.

**2** Prelegoj de Raja Iftikhar, esperantisto el Padova:
Raja informas ke li pretas prezenti 3 mallongajn prelegojn:

- Temo 1: 20-jara persona sperto kiel enmigranto el Pakistano en Italio
- Temo 2: prezento de sia tasko kiel prezidanto de la konsilio de eksterlandanoj en Padova
- Temo 3: Rifuĝantoj venantaj al Padova ricevas loĝlokojn ĉe familioj en Padova.

Plie ni havas la ideon ke Raja povus prelegi en la itala lingvo (eventuale en la centro Sermig) pri tiuj aktivecoj, tiel ke ni havos efikon al la ekstera mondo dum la UK.

**3** Prelego: Klimatŝanĝo kaj migrado. Giuliano Turone (profesoro, eksa juĝisto de la Supera Apelacia Tribunalo de Italio) prelegos pri la rilato inter klimatŝanĝo kaj migrado: La venontaj klimatŝanĝoj neeviteble pliigos supermezure la fenomenon de migrado, kaj ili praktike malebligos la totalan fermon de iu ajn regiono de alveno, escepte se ĝi estas regiono sen maraliroj, kies loĝantoj decidus elekti preskaŭ-suicidan solvon: konstrui nesupereblan muron en kiu sin enfermi.

4 Prelego: Migrado estas evoluo. Judith Jackson (doktoro pri biologio) analizos la temon el natur-scienca vidpunkto: Migrado ĉiam estis kaj estas esenca por la evoluo de vivo (ĉu plantoj, ĉu bestoj, ĉu homoj).

**5** Prelego de Amri Wandel: Israelo kiel lando de enmigrintoj

**6** Prelego de Jeremie Sabiyumva: Spertoj kiel migranto. Jeremie skribas: Miaj gepatroj migris al DR Kongo en 1972, kaj mi naskiĝis tie. Mi havas plurajn spertojn pri migrado, kiujn mi ŝatus dividi kun kongresanoj.

**7** Prelego de Thomas Bormann: Ekzemplo Stutgarto – urbo de enmigrintoj – ĉu integriĝo funkcias? En la sudgermana urbo Stutgarto vivas 614 000 homoj, 278 000 el inter ili havas migrantan fonon – au ili mem migris de alia lando al Stutgarto au iliaj gepatroj.

**8** Prelego de Thomas Bormann: 100 milionoj da rifuĝintoj tutmonde - rapide kreskanta cifero. Dum la pasintaj dek jaroj la nombro de rifuĝintoj en la mondo duobliĝis. 42 % estas infanoj, 69 % vivas en najbaraj landoj. La prelego prezentas la obstaklojn kaj por migrantoj kaj por enloĝantoj en la landoj ĉirkau la Mediteranea maro.

**9** Prezento de filmoj de Roman Dobrzynski pri Bona Espero
La Esperanta edukejo „Bona Espero" en Brazilo estas modelo por la kunfluo de homaj valoroj. La pola verkisto kaj televida ĵurnalisto Roman Dobrzynski plurfoje vizitis la edukejon „Bona Espero" kaj produktis entute naŭ filmojn pri Bona Espero, en diversaj longecoj. Ĉiutage je la sama horo (kvazaŭ en festivalo) la filmoj estos prezentitaj dum la UK en Torino (parte unu filmo tage, parte pluraj mallongaj filmoj tage). Gesinjoroj Grattapaglia kaj Roman Dobrzynski ĉeestos la kongreson en Torino.

**10** Lautema ekskurso al Sermig, centro por migrantoj en Torino.

Ni vizitos la Sermig-centron por migrantoj en Torino. Ne estas grandaj organizaj obstakloj: Oni povos atingi la lokon per publikaj transportiloj au eĉ piede. Ne necesas kotizo por tiu ekskurso, sed alvoko al partoprenantoj donaci sumeton al Sermig. Paola sondos kiu Sermig-ano povos ĉiĉeroni grupo(j)n de kongresanoj tra tiu centro. Eventuale tia ekskurso povos okazi plurfoje dum la semajno. https://www.sermig.illorg/arsenali/arsenale-della-pace.html Dum la vizito estus interese havi prezentadon pri ĝia historio kiu fakte reprezentas gravan ekzemplon de la Torina vojo por mastrumado de enmigrintoj (prelego en la itala kun traduko).

**11** Podia diskuto: La rolo de la Esperanto-movado en migrada politiko.
Ni cerbumu, kiu povus esti sur la podio.

Jen la superrigardo pri la stato de la prepar-laboroj. Pliaj proponoj estas same bonvenaj kiel komentoj pri la ĉi-supraj 11 proponoj.

Thomas Bormann, prizorganto de la temaj preparoj (kaj realigo)

## Vojaĝu al Torino per biciklo

Jam tri esperantistoj aliĝis al la BEMI-karavano al la Universala Kongreso. Nenio estas jam firme decidita, sed la provizora plano estas starti matene en sabato, la 22-a de julio 2023, en Balgach SG. En la ebenaj partoj kiel Rejno-valo kaj Pado-ebenaĵo (Pado : Po en la itala) tagaj distancoj estos ĉ. 70 km, en montaro ĉ. 40 km.
Al montpasejo supren eblos veturi ankaŭ per publika transporto, kiu konsentas akcepti biciklojn. Se vi preferas starti de alia loko en Svislando, kontaktu la organizanton: ĉion eblas ankoraŭ ŝanĝi.

Informoj kaj aliĝo: Lars Sözüer, lars.duisburg@gmx.de

========= vortoj: 950 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.